

VIZITIS KAJ VIZITOS NIN

Kiel ni informis en pasinta numero, dum junio vizitis nin pluraj samideanoj el Francio, kiuj rendezuis en la grupejo aŭ en diversaj partoj de la regiono kun lokaj esperantistoj. Speciale menciinda estis la ekskurso al la montaro organizita kun Bert kaj Ĵanik, respondeculoj de la kultura kastelo Gresiljono. Vidu apude foton de ripoza momento dum supreniro.



Rubén Sánchez, el Argentino, gastos en Madrido inter la 6a kaj 9a de julio. Li celas viziti la urbeton El Escorial la 9an de julio; tial li kontaktis kun Manolo Pancorbo, ekleginte en Pasporta Servo ke tiu ĉi loĝas proksime. Ili jam preskaŭ interkonsentis pri tiu vizito (al kiu aliaj povas libere aliĝi). Aliaj rendezuoj estos anoncataj per la kutimaj forumoj.

Juna esperantisto el Koreo, SHIN Hyunkyu (Esperanto-nomo: Mondero) kun sia plijuna frato, komencanto, vojaĝos Eŭropon dum somero, kaj troviĝos en Madrido de la 16-a de julio vespere ĝis la 20-a matene. Se iu povas ilin gastigi, bv. skribi al azesper (ĉe) gmail.com. Ni aranĝos renkontiĝon kun ili dum tiuj tagoj.

MONTARA EKSURSO EN AŬGUSTO

Tiom plaĉis la montara migrado de junio, ĵus menciita, ke ni jam planas la sekvan. Ĝi okazos la festan sabaton 15an de aŭgusto. La elektita itinero estas ne vere en la montaro, ni diru ke temas pri montetaro. Ni marŝos laŭlonge de la rivero Lozoya (ire-revene laŭ la sama vojo) en areo proksima al la fama vilaĝo Patones. La starta punkto estas apud 19-jarcenta digo nomata Pontón de la Oliva; celo povas esti alia malnova digo nomata Presa de la Parra, kiu teorie distas du horojn kaj duono; sed laŭkonsente eblas returni pli proksime. Preskaŭ ebena estas la pado apud la rivero, foje sub ombro de grandaj arboj kiel poplo kaj moruso.

Do se vi ŝatas malkrokodile migri en la naturo, rezervu jam tiun tagon. Vidu ankaŭ la eventon en la socia reto Facebook: <https://www.facebook.com/events/1440421786263798/>

ALIAJ KUNVENOJ KAJ BABILRONDOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL, plu okazas lunde vespere post la 18,30. Atentu: dum aŭgusto kaj eble iujn semajnojn de julio la sidejo povos resti fermita.

La unuasabata ekstera renkonto okazos denove en julio en la parko de Retiro, la 4-an, je la 6-a apud la statuo de Ricardo Codorniu, tre proksime al la *Palacio de Cristal*. Kelkaj sugestis ke poste tiuj interesitaj povos iri partopreni aŭ spekti la Gejan Paradon okazontan dum tiu tago.

PLIA ĈEESTO EN SOCIAJ RETOJ

Nun ekzistas grupo de Esperanto en *meetup*, socia reto kiu celas renkontigi homojn de la sama urbo kun samaj interesiĝoj: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>

Ĝin kreis Álex kaj la koston (5 dolarojn monate) pagas MEL. Jam 50 homoj membras en ĝi kaj ni ĉiuj bonvenas por partopreni en la forumoj, proponi renkontiĝetojn, kaj montri ke ni iros. Tiel ni pli instigos la novulojn ĉeesti. Ankaŭ eblas organizi kursojn, disvastigi okazaĵojn, ktp. Esploru la retejon mem.



Esperanto and Its Rivals
The Struggle for an International Language
Roberto Garvía

LIBRO DE MADRIDA PROFESORO PRI ESPERANTO

Oni ĵus eldonis libron pri Esperanto, en la angla lingvo, ĉe la eldonejo de la universitato de Pensilvanio. Ĝia titolo estas "Esperanto and Its Rivals, the Struggle for an International Language" (Esperanto kaj ĝiaj rivaloj, la lukto por internacia lingvo). La aŭtoro estas Roberto Garvía, profesoro de Sociologio de la universitato Carlos III de Madrido.

En la libro, Garvía analizas la movadojn por internaciaj lingvoj, fokusigante sian atenton en la malsamaj strategioj sekvitaj de la partianoj de Volapuko, Esperanto kaj Ido. Li esploras la kialojn pro kiuj Esperanto venkis en la batalo kontraŭ la ceteraj konstruitaj lingvoj, sed tamen malvenkis en la milito kontraŭ la angla kiel internacia mondlingvo.

Garvía verkis ĝin ĉefe dum sia estado en Usono kiel profesoro de la katedro "Princo de Asturio", kiun la hispana registaro sponsoras en la universitato Georgetown.

RESTORACIO EN MADRIDO

Ĉu vi scias ke ekzistas en Madrido restoracio nomata KUIRU? Ĝi situas en strato Santa Engracia 141, apud Cuatro Caminos: <http://www.restaurantekuiru.com/>

En la paĝaro nenio diras pri la deveno de la nomo, sed ĝi havas plenan sencon ĉar la kliento povas mem interveni en la kuirado de sia manĝaĵo.

LA HISPANA KONGRESO DE 2016 OKAZOS EN EKSTREMAURO

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio akceptis la proponon okazigi la 75an Hispanan Kongreson de Esperanto en Herrera del Duque, inter la 30 de junio kaj 4 de julio 2016.

Herrera del Duque estas urbo en Ekstremaduro, ĉefurbo de regioneto konata populare kiel "La Siberio". La loko estas tre riĉa je naturaj havaĵoj. Krome, ĝi troviĝas sufiĉe proksima al Guadalupe kaj Mérida, kien oni planas organizi turismajn vizitojn. La urbo estas relative malgranda kompare kun ĝisnunaj kongresurboj, sed havas sufiĉe da gastigeblecoj kaj da necesaj infrastrukturoj. Ĝi estas facile atingebla per ŝoseo, interalie el Madrido, el kie HEF provos organizi komunan transporton, se necese.

La LKK jam komencis la planadon, kaj dum venontaj semajnoj oni informos pri la decidoj. La unuajn informojn eblas jam legi en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso>. Utiligu la adreson kongreso@esperanto.es por kontakti la organizantojn. Ni plu informos tre baldaŭ.

PLIAJ INFORMOJ

La venonta numero de "Nia Voĉo" estos eldonata fine de aŭgusto.

Dume, por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj kaj specife pri la planataj renkontoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, aŭ la retan diskutejon pri ĝeneralaj esperantaj novaĵoj en Madrido http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/. En la socia reto Facebook, atentu du forumojn: tiun de MEL, ĉe <https://facebook.com/esperanto.madrid>, aŭ la pli ĝeneralan <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com